

**13a ORDINARA DIMANĈO – 2an de JULIO 2017**

**KIU NE PRENAS SIAN KRUCON, NE ESTAS INDA JE MI.  
KIU VIN AKCEPTAS, TIU AKCEPTAS MIN**  
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

**El la evangelio laŭ Mateo 10, 37-42**

**En tiu tempo Jesuo diris al la dek du:**

**„Kiu amas patron aŭ patrinon pli ol Min, tiu ne estas inda je Mi; kaj kiu amas filon aŭ filinon pli ol Min, tiu ne estas inda je Mi. Kiu ne prenas sian krucon kaj ne sekvas Min, ne estas inda je Mi. Kiu klopodas gardi sian vivon, ĝin perdos; kaj kiu estos perdinta sian vivon por Mi, tiu ĝin retrovos.**

**Kiu akceptas vin, akceptas Min; kaj kiu Min akceptas, akceptas la Patron, kiu sendis Min. Kiu akceptas profeton kiel tian, ricevos rekompencan indan je profeto. Kaj kiu akceptas justulon kiel tian, ricevos rekompencan indan je justulo. Kiu donas por trinki eĉ nur tason da freŝa akvo al unu el ĉi tiuj malgravaj homoj, ĉar tiu estas mia disĉiplo, li nepre ricevos rekompencan.**“

Vino nova en novaj felsakoj, jen la anonco de Jesuo. Kion ĝi signifas? La nova rilato, kiun Jesuo venis proponi kun Dio, estas neakordigebla kun ĉiuj ekzistantaj sistemoj religiaj, sociaj kaj familiaj, kiuj estis bazitaj sur obo kaj sur povo, kaj Jesuo, per sia anonco, per ĉi tiu nova rilato kiun li proponas kun Dio, ne plu bazita sur obo kaj ĝiaj leĝoj, sed sur akcepto kaj ĝia amo, trafas la tri sanktajn valorojn, sur kiuj staris la socio, sanktajn valorojn, nepridiskutatajn valorojn: Dio, patrujo, familio. Kaj Jesuo komencas ĝuste de la familio, kie estis nepridiskutata la povo de la edzo super la edzino, kaj de la patro super la gefiloj. Jen kial Jesuo, citante profeton Miĥan, estis anoncinta, ke la agado de la mesio estas tiu, disigi, disigi la viron disde lia patro, la filinon disde ŝia patrino, la bofilinon disde ŝia bopatrino, tio estas, la novo estas disigita disde la malnovo, kiu rezistas al ĉi tiu novaĵo.

Kaj, en la peco, kiun la liturgio prezentas al ni hodiaŭ, Jesuo asertas: «Kiu amas patron aŭ patrinon pli ol Min, tiu ne estas inda je Mi; kaj kiu amas filon aŭ filinon pli ol Min, tiu ne estas inda je Mi.». Kion ĝi signifas? La unua mesaĝo de Jesuo estas adresita al la gefiloj, kaj poste al la gepatroj, sed la signifo estas sama: liberigi la personojn de tiuj rilatoj, kiuj nomiĝas ligoj, ĉar ĝuste tiuj rilatoj ligas. Jesuo ne volas ligitajn personojn, Jesuo volas liberajn personojn.

Tiam la unua mesaĝo estas al la gefiloj, ili malligu tiujn ligojn de oboe, de dependeco je la gepatroj, kiuj malhelpas al ili kreski, plene sukcesi. Kaj poste Jesuo turniĝas ankaŭ al la gepatroj, kiuj devas disiĝi de tiuj ligoj kun la gefiloj kiuj forgesigas al ili, ke antaŭ ol esti gepatroj, ili estas geedzoj, do Jesuo invitas al la plena libero. Nature, kiu akceptas ĉi tiun mesaĝo de Jesuo, estas taksata frenezulo, estas rifuzata de iu socio, kiu ŝuldas sian ekziston al ĉi tiuj valoroj de oboe, al ĉi tiuj sanktaj valoroj. Tiam komenciĝas la persekuto.

Jen kial Jesuo, kaj tio aperas unuafoje en la Evangelio de Mateo, asertas: “Kiu ne prenas sian krucon”, la kruco ne estas donata de Dio, la kruco ne devas esti akceptata, la kruco devas esti prenata de la homo. Jesuo rilatigas sin al la horizontala trabo, kiun la kondamnito, je la momento de la kondamno, metis sur siajn ŝultrojn, por esti kondukata al la loko de la ekzekuto. La kruco signifis la rifuzo fare de Dio, fare de la popolo, do ĝi signifis la kompletan perdon de sia reputacio. Nu, Jesuo volas liberajn personojn, kapablajn eĉ perdi sian reputacion.

Kaj jen, pro tio Jesuo pludiras: “Kiu klopodas gardi sian vivon,”, gardi sian vivon signifas reteni ĝin por si, “ĝin perdos;”, kontraŭe “kiu estos perdinta sian vivon por Mi, tiu ĝin retrovos.”. Kion volas diri Jesuo? Kie estas senlima amo, estas senlima vivo, do kiu zorgas pri si mem pereigas sin, kiu zorgas pri la aliaj plene sukcesas.

Kaj poste, jen la surprizo de la anonco de Jesuo: “Kiu akceptas vin, akceptas Min;”, Jesuo parolas pri la persono kiu akceptis la krucon, kiu surprenas la krucon en sian vivon. Nu, tiu kiu portas la krucon ne estas, kiel opiniis la religio, iu malbenito de Dio, sed la videbla manifestiĝo de Dio mem. Jen kial, diras Jesuo, “kiu Min akceptas, akceptas la Patron, kiu sendis Min.”. Do la akcepto de ĉi tiu kruco, la surpreno de ĉi tiu kruco, la takso kiel malbenitoj de Dio, kiel rifuzitoj de la socio, en realo montras la ĉeeston de Dio.

Poste Jesuo, per tipe rabena lingvaĵo, diras ke “Kiu akceptas profeton kiel tian, ricevos rekompencan indan je profeto.”, same por la justulo, kaj kiam fine li diras “Kiu donas por trinki eĉ nur tason da freŝa akvo”, nome kiu havigas

akcepton, "al iu ĉar tiu estas disĉiplo", oni atendus "li ricevos rekompenco kiel disĉiplo, kaj kontraŭe jen la fina surprizo de Jesuo: "Kiu donas por trinki eĉ nur tason da freŝa akvo al unu el ĉi tiuj malgravaj homoj" (la greka termino "mikron", kiu signifas tre malgrada, malgravega, montras, ke oni parolas pri la marĝenigitoj, la rifuzitoj de la socio, "ĉar tiu estas mia disĉiplo", nome ĉar li surprenis sian krucon, "li nepre ricevos rekompenco.". Kiu akceptas disĉiplon, ne havos la rekompenco kiel disĉiplo, sed la ĉeeston mem de Jesuo kaj de la Patro.

La mesaĝo de ĉi tiu peco de la Evangelio estas tre, tre klara: nenia ligo, Jesuo bezonas liberajn personojn. Nenia ligo, eĉ ne kun Dio, ĉar Dio ne sorbas la homon, sed lin plipotencigas, Dio ne ligas la personojn al si, sed Li ilin liberigas, Dio ne retenas la unuopulojn, sed Li puŝas ilin iri kun Li kaj kiel Li al la homaro.